



<http://esperantotv.net/programoj/?video=731730>

13-a de februaro 2015 : Monda Tago de la Radio Mesaĝo de Unesko, prezentita de s-ino Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro

En 2015 la Monda Tago de la Radio estas dediĉita al la junularo. La malpli ol 30-jaruloj estas pli ol la duono de la homaro, tamen ili estas signife ekskluditaj de la decidoj sociaj, ekonomiaj aŭ demokratiaj, kiuj koncernas ilin.

Junuloj ne sufiĉe ĉeestas en la amaskomunikiloj, kaj ekzistas tre malmultaj elsendoj produktitaj, redaktitaj aŭ dissenditaj fare de junuloj. Tiu amaskomunikila ekskludo pluvivigas la stereotipojn kaj kreas malegalecojn. La junuloj ja aktivas kiel civitanaj ĵurnalistoj, memstaraj ĵurnalistoj kaj multe da grandaj amaskomunikiloj dependas de ilia laboro, sed ni devas fari pli.

Donante la paroleblon al la junularo, ni povas liberigi konsiderindan energion necesa por la renovigo, evoluigo de la socio. Subtenante la junulojn per edukado, formado de ĵurnalistoj, pri la traktado de temoj, ni povus konstrui socion pli inkluzivan pli prosperan.

Ĉiutage la radio helpas ŝanĝi niajn rigardojn al la mondo kaj pensojn kaj povas ankaŭ helpi nin ŝanĝi la mondon.

Ĉi tio estas la mesaĝo de Unesko okaze de tiu ĉi Tago de la Radio, kaj mi alvokas ĉiujn tiujn, kiuj aŭskultas min, diskonigu ĝin ĉie.

Esperanto-versio: [Stefano Keller](#), Estrarano de [UEA](#)



mp3: <http://goo.gl/wWBZKI> | pdf: <http://goo.gl/G4L55h> | Word: <http://goo.gl/nRAsmf>

www.uea.org | www.esperanto.net | www.lernu.net
www.lingvo.info | www.linguistic-rights.org
www.muzaiko.info | www.esperantotv.net

